

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Joachim Gießner

1. La luno jam leviĝis,
steletoj ekheliĝis,
ravante homojn nin.
Silentas la arbaro
kaj super la kamparo
nebulo pala levas sin.

2. Neniu vento blovas,
la mond' ne plu sin movas
sub paca, klara lun'.
Nun petu noktan benon,
de l'tago la ĉagrenon
dormantaj vi forgesu nun.

3. Jen luno sur ĉielo
en brila ronda belo
duon-videbla nur.²
Ĉar multon ni ne vidas,
ni ofte ĝin priridas,
malsaĝe juĝas kun plezur'.

4.
.....
.....
.....
.....
.....

5.
.....
.....
.....
.....
.....

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Guido Holz

1. La luno nun ekhelas,
Steletoj oraj belas
En la ĉiela klar';
L'arbaro nigra revas,
Kaj el herbejo levas
Mirige sin nebula mar'.

2. Silenta estas mondo
Kaj en krepuska rondo
Hejmecas kun favor'!
Similas kalman ĉelon,
En kiu vi kverelon
De l'tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?
Aspekto nur duonas,
Sed rondas ĝi en bel'.
Do ankaŭ estas multo,
Loganta al insulto,
Okulojn ĝenas la malhel'.

4. Ni homoj tiel vantaj
Ja estas nur pekantaj,
Malvasta nia sci';
Ĥimerojn ni eltrikas,
Ni multe artifikas
Kaj perdas celon pli kaj pli.

5. Vidigu, Dio, savon,
Pasem' ne veku ravon,
Ne ĝoju ni pro glor'!
Fariĝu malafektaj
Ni kaj al vi respektaj,
Infane gaju nia kor'!

...

²S-ro Gießner unue tajpis:
duona tamen nur.

6.

7. Ĉe l'fino de la tago
 kuŝigu vin sen plago,
 silentas la anim'.
 Ne punu nian faron,
 sed nin kaj la najbaron
 dormigu, Dio, nun sem tim'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de
 MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21)
 en Esperanton de JOACHIM GIEßNER (*1913-12-
 23 - †2003-11-25).*

Arg-394-782 (2007-03-28 09:55:34)

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joa-
 chim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi
 en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en
 tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua
 strofo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte,
 estas hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon
 de Otto Bonte.*

6. Vi gracu, sen ĉagreni
 El mondo nin forpreni
 Al fin' per milda mort'!
 Kaj post forpren' fidele
 Hejmigu nin ĉiele,
 Sinjoro, Dio, nia fort'!

7. Kuŝigu do kun pio
 Vi en la nom' de Dio,
 Jam fridas nokta vent'.
 Per punoj, Di', ne ĝenu,
 Per dolĉa dorm' nin benu,
 Najbaron ankaŭ en turment'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de
 MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 - †1815-01-21)
 en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 - †1989).*

Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperan-
 to aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio,
 sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 14 de la nume-
 ro 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon
 el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido
 Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*